



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 24/76 - 14 jun 1976
Aperas ĉiusemajne

Esperanto en Radio

Pli detala
rubriko aperos
en la venonta
numero de PP
=====

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

De la utopio al la realeco - La historio de la planlingvoj Ampleksa artikolo pri Esperanto en svisa gazeto

Winterthur (pp) - Pentekosto, la sezono de "spiritaj mirakloj", ofte pensigas ankaŭ ĵurnalistojn pri la lingva problemo. Sed ĝenerale ĉiokazaj kontribuoj ĵurnalistaj ofte estas tro kritikemaj kaj negativaj por Esperanto.

Senkritika certe ne estas la vere ampleksa artikolo en la svisa gazeto "Der Landbote", Winterthur, en la pentekosta eldono de la 5-a de junio, sed ĝi estas nepre objektiva kaj verkita de fakulo, kiu vere scias pri la problemoj de la temo. La aŭtoro estas d-ro Arthur Baur, ĉefredaktoro de la gazeto, konata esperantisto kaj Esperanto-parolisto de la Svisa Kurtonda Servo. La lingva problemo ne estas temo, pri kiu oni povas entuziasmigi la legantaron, kio eble estas ankaŭ la kaŭzo ke malofte aperas en la gazetaro kontribuoj, kiuj principe traktas la problemon de internacia lingvo. Estas do rekoninde, ke la redakcio de la kultura aldono "Zeichen und Werte" al "Der Landbote", tagĵurnalo de Winterthur kaj ĉirkaŭaĵo, pensigis siajn legantojn pri la lingva problemo.

La artikolo sur tri grandformataj paĝoj havas kvin ĉefajn partojn kun jenaj titoloj:

- 1) La lingva problemo en la hodiaŭa mondo
- 2) Kial internacia lingvo?
- 3) Cent jarojn Esperanto
- 4) Domaĝe pri la maltrafita ŝanco (Volapük)
- 5) Interlingvistiko kaj planlingvoj

Ne eblas per kelkaj linioj skizi la enhavon de tiu elstara traktaĵo, kiu fakte prezentas koncizan analizon priskribon de la celoj de la Esperanto-movado kaj de la historia evoluo. Multaj argumentoj ja estas konataj al informita esperantisto. Speciale interesa estas la prijuĝo de la lingva problemo en la propra lando de la aŭtoro, en Svislando. Laŭ li la lingva problemo en Svislando ne jam estas kontentige solvita.

Dr. Arthur Baur ankaŭ analizas la ŝancojn de Esperanto. Laŭ la spertoj kun la Ligo de Nacioj kaj Unuiĝintaj Nacioj la klopodoj - tiel opinias la aŭtoro - enkonduki Esperanton de supre - malsukcesis. Necesas premo de malsupre, de kiel eble plej larĝa bazo demokrata de Esperanto-uzantoj, kiuj povus influi la registarojn. Sed por atingi tion necesus krei amasajn, popolajn movadojn. Tamen estas por la aŭtoro dubinde, ĉu por tio ekzistas la kondiĉoj - pro manko de emocia elemento kaj pro la fakto, ke la plej multaj homoj kontentigas kun la propra gepatra lingvo.

Por la aŭtoro Esperanto estas vivanta fakto, kiun neniu povas ignori, kiu sin okupas pri la aktualaj lingvaj problemoj.

La parto pri interlingvistiko kaj planlingvoj fakte estas recenzo de la antaŭnelonge aperinta libro "Plansprachen, Beiträge zur Interlinguistik".

La aŭtoro ankaŭ mencias la libron "Esperanto en Perspektivo", kiu prezentas la disvastigon kaj aplikon de Esperanto. Sed laŭ li ĝi devus aperi en naciaj lingvoj, alikaze ĝi "restas esperantista incesto".

Estus dezirinde, ke multaj esperantistoj legu ĉi tiun artikolon; ankaŭ ili povus multon lerni.

En la germanlingva eldono de Pilo-Press "END", n-ro 10/76, aperis pli ampleksa preparolo de tiu "pentekosta surprizo".

Iniciato el Bonn

Bonn.- La studenta Laborrondo Esperanto en Bonn, kiu jam depost kvin jaroj regule aranĝas Esperanto-kursojn en la universitato, nun ellaboris propran lernolibron uzotan en tiuj kursoj. Fakte ĝi estas jam nun testata en du paralelaj kursoj kun bonaj rezultoj. La libro titolita "Praktiku kun ni Esperanton" estas verkita nur en Esperanto kaj prezentas en dek du lecionoj la ĉiutagan parolan lingvon. Kvankam ĝi estas antaŭ ĉio destinita al uzado en kursoj laŭ senpera metodo, ĝi taŭgas ankaŭ por memlernado. Tion ebligas la fonetika enkonduko, kiu uzas la transskriban sistemon de API (= Internacia Fonetika Asocio) kaj la antaŭlecionoj, kiuj per bildoj kaj difinoj enkondukas ĉiun novan vorton kaj gramatikan struktureron. Krom tio, ke tiu strukturo de la libro ebligas la memlernadon, ĝi ankaŭ estas helpo por malpli lertaj kaj malpli spertaj instruantoj laŭ senpera metodo. Ĉiu leciono konsistas el tia antaŭleciono, dialogo (ĉiuj dialogoj kune formas amuzan rakonton) kaj ekzercaro, kelkaj enhavas ankaŭ enigmojn, ŝercojn kaj aldonajn literaturajn tekstojn. Fine de la libro troviĝas sur dek tri paĝoj konciza sistema gramatiko (fonologio, morfologio, derivado kaj sintakso). Aldona kajero - inkluzivita en la vendoprezon - enhavas germanalingve antaŭvortojn pri la uzado de la lernolibro kaj de la vortaro, enkondukon pri la strukturo de la lingvo, utilajn adresojn kaj ĉ. tridekpaĝan vortoliston kun tradukoj en la germana. La listo enhavas absolute ĉiujn vortojn (! vortojn, ne nur radikojn) de la lernolibro.

La lernolibro ampleksas 116 paĝojn de formato DIN A 4 + ĉ. 40 paĝojn de la aldonaj kajeroj. Vendoprezon: 9,- gmk + 2,- gmk por sendokostoj. Ĉe aĉetado de minimume kvin ekzempleroj forfalas la sendokostoj. Ĝis la 10-a de julio validas subskripcia prezo de gmk 7,-, sendokostoj kiel supre. Mendu sendante la monon al pĉk 278368-503 Köln, por Heike Lühmann (Esperanto), aŭ skribu al: Hartmut Trunte, Sebastianstr. 43, 5300 Bonn 1. Telefonajn mendojn akceptas Heike Lühmann (nur vespere): 02241-20163. La subskripcia prezo validas nur ĉe antaŭpagado.

Richard Schulz - la aŭtoro de "Mia Amata Esperanto"

Kun intereso kaj scivolemo multaj germanlingvaj esperantistoj certe atendas la de kelkaj monatoj anoncitan poŝlibron en germana lingvo "Mein geliebtes Esperanto" (Mia amata Esperanto) de Richard Schulz.

La eldonejo, Bleicher-Verlag, anoncis ĝian aperon por mezo de junio, sed verŝajne ĝi eliros nur fine de ĉi tiu monato. La kelkaj centoj da antaŭmendintoj do devas ankoraŭ pacienciĝi!

Kiu nun estas la aŭtoro, kiu sukcesis ne nur verki manuskripton, sed trovi eldo-niston por ne tro ŝatata temo de la germana eldonistaro?

Richard Schulz estas emerita gimnazia instruisto, kiu desegnas, pentras, faras poemojn, ludas fluton, praktikas Esperanton, li do estas muza homo. Li konatiĝis kun Esperanto kiel dekjara knabo per libreto pri Volapük, Ido kaj Esperanto, lernis la lingvon antaŭ la dua mondmilito en la jaro 1932, perdis - kiel multaj aliaj - la kontakton al la Esperanto-movado kaj nur en 1975 okaze de la Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch li retrovis la vojon al Esperanto. Kaj tiu rekontaktiĝo tuj instigis lin al la verkado de tiu poŝlibro.

Do, la libron ne verkis malnova "movadisto" spertinta jam amarajn flankojn de la Esperanto-movado. Verkis ĝin idealisto plena da amo kaj entuziasmo al sia retrovita "perdita infano", nur mallonge post la t.n. "Hamburgaj eventoj", pri kiuj li aŭdis. Tiel la deziro kaj intereso rigardi la bildon de la "amata Esperanto" estas komprenebla.

Cetere, Richard Schulz scias paroli per bildoj. Tion pruvas la 25 Antes-karikaturoj, kiujn li desegnis kaj kiuj libroforme aperis en 1972, kaj la 12 tuĉodesegnaĵoj sub la titolo "Kosmogenetikaj Agregatoj" aperintaj ĉe la sama eldonejo, Bleicher-Verlag, kiu ankaŭ la "Amatan Esperanton" eldonas. Sur la lasta paĝo de ĉi tiu numero estas publikigita tia tuĉodesegnaĵo "Agregato", kiu certe kontribuas al la bildo pri la aŭtoro de la poŝlibro.

Momente Richard Schulz tradukas la historiojn de Strigospegulo (Eulenspiegel) kaj produktas limerikojn.

Jen unu ekzemplo:


L i m e r i k o

Eniris Valono salonon
kaj petis tre prave pardonon,
ke hazarde li ternis.
Kio tion koncernis,
li kaŭzis kirlegan ciklonon.

Nekompleta estus la skizo pri Richard Schulz, se mi ne menciis siajn prelegojn pri Esperanto en germana lingvo jam kelkfoje prezentitajn antaŭ societoj.

Esperanto en Radio

Fine mi sukcesis kapti la Esperanto-elsendon de Radio Vatikana, sabate, la 12-an de junio, je la 24,30 horo. Fakte oni ne povas paroli pri aparta Esperanto-programo, ĝi nur daŭras kelkajn minutojn kadre de muzika programo. Aŭdiĝis ina kaj vira voĉoj, kiuj prezentis la voĉojn de kelkaj papoj sur la Vatikana Anteno. Kvankam nur estis mallongaj Esperantlingvaj klarigoj, tamen estis sufiĉe interese. Je la fino oni anocis ke estas havebla la programkajero de Vatikana Radio, skribante al la adreso: Radio Vaticana, Città del Vaticano.



Agregato (apelo por Au-desegus)

1972
Richard Schulz